

Veranstaltungshinweise

Wir haben Esp.-Lernrunden für Anfänger (Einzelheiten: Anne; s. Impressum) u. Fortgeschrittene (do. 20:30-21:15 Uhr per Skype). Und:

22.06.2017 19:30 Uhr	BEGU, Edenbütteler Str. 5, 27809 Lemwerder	Vereinstreffen
12.08.2017	Besichtigung der Autostadt Wolfs- burg; mehr: https://goo.gl/kSgQ0H	Wolfsburg
21.09.2017 19:30 Uhr	Kogge, Rathausplatz 7, 26931 Elsfleth	Vereinstreffen

Gäste sind willkommen. Aktuelles u. Einzelheiten können unserer Netzseite (s. unter „Impressum“) entnommen oder bei Alke Geveke, Tel.: 0160-3760850, erfragt werden; allerneueste Infos: <https://twitter.com/egu1995>. Außerdem:

02.-05.06.2017	94. Deutscher Esp.-Kongress	Freiburg
22.-29.07.2017	102. Esperanto-Weltkongress	Seoul, Südkorea
05.-12.08.2017	73. Internat. Jugend-Kongress	Aneho, Togo
25.-26.11.2017	30 Jahre Ratkaptista Bando	Hameln



Zu guter Letzt: Nach etwa sechs Jahren Pause gibt es seit Frühjahr 2017 wieder das Gastgeber-Adressverzeichnis „Pasporta Servo“ als gedrucktes Buch.

Impressum:

Zeitschrift:

Erscheinungsweise:

Herausgeber:

Information und Redaktion:

Bankverbindung):

Esperanto Gazeto (ISSN 1861-3330)
dreimal jährlich als Druck- u. elektronische Ausgabe,
Netzseite: <http://www.esperanto.de/unterweser/gazeto.htm>
Esperanto-Gruppe Unterweser e. V.
(<http://www.esperanto.de/unterweser>)
Anne Höpken, Schulstr. 13a, 26954 Nordenham, Tel.: 04731-4837;
Dörte Bierkämper, Tel.: 04404-3368; Dr. Andreas Kück,
Tel.: 04702-5044; Mario Müller, Tel.: 04732-1373
Raiffeisenbank Oldenburg eG, IBAN: DE26280602281200160000
Kassenwartin: Dörte Bierkämper

EGU - Esperanto - Gruppe Unterweser e. V.


Esperanto Gazeto

N-ro 49

ISSN 1861-3330

Jun. – Sep. 2017

EGU-Info: <http://www.esperanto.de/unterweser>



Die neue App **Amikumu** zeigt nahe Esperanto-Sprecher – auch in der Unterweser-Region.

La nova apo **Amikumu** montras proksimajn Esperanto-parolantojn – ankaŭ en regiono Unterweser.

**Unser Vereinstreffen mit dem Thema „Anzahl der Esperanto-Sprecher nach dem Modell von Svend Vendelbo Nielsen“
(Oldenburg, 20.04.2017)**

Ohne zu sehr ins Detail zu gehen, stellte ich das Prinzip des statistischen Modells vor: Eingabegrößen sind zunächst – für jedes Land von 175 Ländern – die Mitgliederzahlen von sechs Esperanto-Organisationen. Diese Mitgliederzahlen werden – ebenfalls für jedes Land – durch eine Gleichung modelliert. Sie beinhaltet u. a. die Anzahl der Esperanto-Sprecher des jeweiligen Landes. Diese Anzahl folgt dann aus einer Anpassungsrechnung und einer abschließenden Skalierung aufgrund von Ergebnissen von Volkszählungen. Ich hatte diese Rechnungen mittels des Internetprogramms „Google-Tabellen“ und Svends Hilfe nachvollziehen können. Hauptergebnisse: Sprecherzahl weltweit: ca. 62.000; Rang 1: Brasilien mit ca. 7.300 Sprechern. Es folgen Frankreich (ca. 6.900), USA (ca. 5.800) und Deutschland (ca. 3.900). Einzelheiten: <https://goo.gl/jy8718>. – Andreas

**Nia klubrenontiĝo kun temo “Numero de Esperanto-parolantoj laŭ la modelo de Svend Vendelbo Nielsen”
(Oldenburg, 20a de Aprilo 2017)**

Sen menciado je tro da detaloj mi prezentis la principon de la statistika modelo: Endon-valoroj estas unue – por ĉiu lando el 175 landoj – la nombroj de membroj de ses Esperanto-organizaĵoj. Tiuj ĉi membronombroj estas – same por ĉiu lando – modelataj per ekvacio. Ĝi entenas interalie la nombron de Esperanto-parolantoj de la respektiva lando. Tiu ĉi nombro poste rezultas el adapta kalkulado kaj fina skalado surbaze de rezultoj el popolnombroj. Mi estis povinta reprodukti tiujn kalkuladojn per la interretprogramo „Guglo-Tabeloj“ kaj helpo de Svend. Ĉefaj rezultoj: Numero de parolantoj tutmonde: ĉ. 62.000; rango 1: Brazilo kun ĉ. 7.300 parolantoj. Sekvas Francujo (ĉ. 6.900), Usono (ĉ. 5.800) kaj Germanujo (ĉ. 3.900). Detaloj: <https://goo.gl/jy8718>. – Andreas

Enigmo

	1	2	3	4	5	Horizontale
1						1: Tviter-mesaĝo [kun finaĵo de akuzativo]; 2: subite montriĝu; 3: intensa; 4: prezentantan sufiĉajn kondiĉojn; 5: kontraŭmone ricevi ion por uzado dum difinita tempo; 6: landkodaĵo de Nov-Kaledonio. Vertikale 1: speco de armilo [sen finaĵo]; 2: kodaĵo de Esperanto laŭ ISO 639-2; 3: nevole seniĝi je io; 4: formantan angulon de 90°; 5: delikata diferenco inter samspecaj aferoj [sen finaĵo]; 7: interjekcio por atentigi.
2						
3						
4		7				
5				6		

Ĝuste ordigite, la literoj en la grizaj ĉeloj rezultigas la vorton uzatan, por nomi ĉielan korpon, ne memlumantan, kaj rondirantan ĉirkaŭ la suno.



*Multkolora nest’
zorgeme kunmetata
shtelema paru’.*
#hajko #Esperanto #printempo

Foto und Haiku von
Cornelia Klee via Twitter, <https://goo.gl/RvnNYx>

Nia klubrenontiĝo kun prelego "Cifereca tera aud-radiofonio (DAB+) chefe konsidere al Malsupra Saksujo, Bremeno kaj Hamburgo"
(Elsfleth, 18a de Majo 2017)

Mi faris prelegon pri la supre menciita temo. DAB+ ("Digital Audio Broadcasting") ebligas aŭskulti radiofoni-elsendojn ciferece sen konsumado je datumoj. Mi montris poŝformatan radioaparaton kaj ekzempleron de la ĝis nun nura smartfon-tipo provizita per DAB+-funkcikapablo. Koncerne la areon Malsupra Saksujo estas preskaŭ komplete provizata per la dek tri radiostacioj de la germana federacia multipleksoro, sed ankoraŭ breĉe per la ok stacioj de la federacilanda multipleksoro. Radiofoniajn elsendojn pri iuj temoj aŭ kun iuj ekskluzivaj muzikstiloj oni povas – tere (t. e. ĉi-kuntekste: per antenoj kaj krome sen satelitoj kaj sen kablo- aŭ interretligo) – aŭskulti nur per DAB+. Al tio apartenas ekz. certaj sportraportadoj, "ARD-Infonacht", parlamentaj debatoj, marvetero kaj ŝlagroj. Konsidere la konkurantajn disvastigojn interreto kaj FM ("UKW") la sens-haveco de DAB+ tamen estas endubigata de iuj. – Pri la prelegtemo mi publikigis artikolon rete en <https://goo.gl/6TNk6g>. – Andreas

Unser Vereinstreffen mit einem Vortrag über digitalen terrestrischen Hör-Rundfunk (DAB+; hauptsächlich in Hinblick auf Niedersachsen, Bremen und Hamburg)
(Elsfleth, 18.05.2017)

Ich hielt einen Vortrag über das o. g. Thema. DAB+ („Digitaler terrestrischer Hör-Rundfunk“) ermöglicht es, Rundfunksendungen ohne Datenverbrauch digital zu hören. Ich zeigte ein DAB+-Taschenradio und ein Exemplar des bisher einzigen mit DAB+-Funktionalität ausgestatteten Smartphones. Bezüglich der Fläche ist Niedersachsen nahezu vollständig mit den dreizehn Radioprogrammen des bundesdeutschen Multiplexes versorgt, aber noch lückenhaft mit den acht Radioprogrammen des Bundesland-Multiplexes. Rundfunksendungen über manche Themen oder mit exklusiven Musikrichtungen kann man – terrestrisch – nur auf DAB+ hören. Dazu gehören z. B. bestimmte Sportberichterstattungen, die „ARD-Infonacht“, Parlamentsdebatten, Seewetter und Schlager. Angesichts der konkurrierenden Ausbreitungswege Internet und UKW wird die Sinnfälligkeit von DAB+ allerdings von manchen in Frage gestellt. – Über das Vortragsthema veröffentlichte ich einen Artikel im Netz unter <https://goo.gl/6TNk6g>. – Andreas

Nia klubrenontiĝo kun temo "Vorto-uzado en Esperanto: principoj"
(Oldenburgo, 19a de Januaro 2017)

Mi klarigis la fluskemon montratan en Esperanto Gazeto N-ro 48. Iu esprimis sian dubon pri tio, ke Zamenhof konsentus pri la fluskemo. Tiu ĉeestanto diris, ke Zamenhof ne estis juristo kaj ke li nek severe nek konsekvence distingis inter "nova vorto" kaj "formo nova". La ĉeestanto atentigis krome pri tio, ke eblas diversa interpretado je la Fundamento.

Jenon mi citis per laŭtlegado el lingva respondo n-ro 54 de Zamenhof "Pri novaj vortoj" (prenita el "Lingvo Internacia", 1904, p. 336–338):

"[...] La ĉefaj principoj de la vorto-uzado en Esperanto estas la sekvantaj:

a) Ĉiu vorto, kiu troviĝas en la Universala Vortaro estas leĝdona por ĉiuj esperantistoj kaj neniu en la mondo, nek la aŭtoro de Esperanto nek ia alia esperantisto havas la rajton fari en tiuj vortoj ian ŝanĝon (se ekzemple anstataŭ 'ŝipo' iu uzas la vorton 'navo', ĉar la vorto 'ŝipo' al li 'ne plaĉas' — tio estus rekta peko kontraŭ la unueco de la lingvo kaj ĉiuj esperantistoj tiam protestus).

b) Se vorto per si mem estas internacia, tiam laŭ la regulo 15 de nia gramatiko ĉiu havas la rajton uzi tiun ĉi vorton, kvankam ĝi ne troviĝas en la Universala Vortaro. (Ekzemple neniu povus protesti kontraŭ la uzado de la vortoj 'aŭtoro' kaj 'telegrafo' k. t. p., kvankam ili ne troviĝas en la Universala Vortaro.)

c) Sed se ia vorto nek estas sendube internacia nek havas por si apartan radikon en la Universala Vortaro kaj esprimi ĝin per kunmeto de radikoj jam ekzistantaj estas aŭ tute ne eble, aŭ tro neoportune, aŭ teknike ne precize, — tiam tiun ĉi vorton ĉiu aŭtoro povas mem krei laŭ sia bontrovo, tiel same kiel oni ĝin faras en ĉiu alia lingvo. Tiu ĉi permeso estas necesa, ĉar alie la lingvo estus tro rigida kaj multajn ideojn oni tute ne povus esprimi en ĝi. Sed ĉar ne ĉiuj personoj povas mem krei al si vortojn kaj ĉar estas dezirinde, ke ĉiuj uzu la novajn vortojn kiom eble egale, tial ĉiu nove aperanta vortaro ordinare enhavas en si kelkan nombron da novaj vortoj sub la kontrolo de l' aŭtoro de Esperanto, por ke ili povu alporti helpon al ĉiuj, kiuj bezonas novajn vortojn kaj ne volas ilin krei ĉiuj arbitre kaj diversmaniere laŭ sia bontrovo. [...] Vi diras, ke la aperado de novaj vortoj faras la lingvon malfacile ellernebla. Sed kial? Ili ja tute ne elpuŝas la antaŭajn vortojn kaj ne ŝanĝas en io la ĝisnunajn principojn de la Esperanta vortfarado ..."

Mi atentigis pri tio:

- La Zamenhof-a “nav”/”ŝip”-klarigo (en a)) estas ekzemplo de “formo nova”.
- Analogaĵo al “nav”/”ŝip” estas “korus”/”ĥor” (alivorte: “korus” estas “formo nova” al “ĥor”).
- La Zamenhof-aj klarigoj sub c) estas pri “novaj vortoj” (Zamenhof ne donis ekzemplojn; mi opinias, ke ekzemploj estas “kurt’a” sinonime al “mal’long’a” kaj “old’a” sinonime al “mal’jun’a”).
- Bonvole notu, ke al la radiko de “nova vorto” ne ekzistas sinonima unuradikaĵo Fundamenta aŭ oficialigita.
- Tiu lingva respondo estas indiko pri tio, ke Zamenhof nepre faris distingon inter “formo nova” (= a), “internacia vorto” (= b) kaj “nova vorto” (= c)).

Krom tio mi iom improvize (do ne laŭvorte) redonis la enhavon de tiu alia teksto de Zamenhof en Plena Verkaro 06–115:

“Dum la enkonduko de novaj vortoj estas afero tute bagatela kaj ne bezonas eĉ la permeson de la Lingva Komitato, la enkonduko de tio, kion mi nomas ‘neologismoj’ (t. e. de novaj formoj, kiuj devos konkuradi kun formoj ekzistantaj jam en la ‘Fundamento’) estas paŝo tiel gravega kaj tiel skuanta, ke ni povas tion ĉi permesi al ni nur tre malofte (ne pli ofte ol unu fojon en 5–10 jaroj).”

Mi atentigis pri tio, ke ankaŭ tiu eldiro de Zamenhof estas forta indiko pri tio, ke li nepre distingis inter “nova vorto” kaj “formo nova”. – Andreas

Die App Amikumu

Spätestens seit ihrem offiziellen Start am 22.04.2017 macht eine App Furore in der Esperanto-Welt: Amikumu. Damit kann der Anwender (geografisch) nahe Sprecher des Esperanto oder auch anderer Sprachen in einer Liste (in künftigen Versionen auch Landkarte) finden und per Sofortnachricht kontaktieren. Amikumu wurde von Chuck Smith und Richard Delamore („Evildea“) ins Leben gerufen und durch eine Geldsammelkampagne auf der Internetplattform Kickstarter finanziert; mehr: <https://amikumu.com/de/>. – Andreas

Amikumu

Amikumu estas apo
(poŝtelefono aplikaĵo),
kiu helpos vin trovi kaj kontakti
proksimajn esperantistojn –
ĉiam, ĉie!

simple iru kaj elŝutu

GET IT ON
Google Play

Download on the
App Store